7-a JARO, N-o 341 LEIPZIG, 16. / 4. 1931

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA
KULTURA KAJ INTERHELPA ORGANIZO DE PROLET-ESPERANTISTOJ


APERAS SEMAJNE | REDAKTEJO: 14, avenue de Corbéra, Paris 12e. — GVIDANTO: E. Lanti. — SIDEJO DE PLENUM-KOMITATO DE SAT: 23, rue Boyer, Paris 20e. — ADMINISTREJO: R. Lerhner, Kolmstrasse 1, Leipzig O 27 (Germanio). | APERAS SEMAJNE

NACIISMO K EKONOMIAJ PROBLEMOJ EN HINDIO

Estas multaj elementoj, kiuj ludas rolon en la nuntempa naciista movado de Hindio, multaj faktoroj, kiuj ĝin subtenas, inter ili la revolucia bolŝevismo, la "svaraj"-partio pli malpli radikala de l' naciista parlamento, la liberalaj aspiroj de l' moderaj aŭtonomiistoj k la deziro de l' indiĝenaj princoj-vasaloj forskui la precipe financan kuratorecon de l' angla administristo, kiu estas aldonita al ĉiu el iliaj ŝtatoj. Sed eble plej gravan rolon ludas la malkontento de l' hindaj kapitalistoj, kiuj kredas esti malgajnintaj pro la stabiligo de l' rupio[1] en jaro 1927; precipe la deziregoj de l' grandindustriistoj, — ankaŭ indiĝenoj — kiuj, en la nuna emancipa movado, havas fiksitaj la okulojn precipe al la eblo liberigi sin de la konkurado de l' anglaj industrioj, k rezervi por si solaj la grandegan merkaton, kiun formas Hindio kun siaj 320 milionoj da loĝantoj.

Jam de longa tempo la indiĝenaj reprezentantoj en la Parlamento de Delhi instigas al senintermanka restarigo de l' doganlimoj, kiuj ĉirkaŭas Hindion, k la financministroj elektitaj de l' vicreĝo, kvankam britaj, devis pli ol unu fojon cedi al tiu ĉi premo, ĉar sekve de la konstitucio de 1919, ili devas starigi la interesojn de Hindio super tiuj de la metropolo. La fer- k ŝtalindustrioj, k precipe la teksa industrio, profitis jam per tiu ĉi protektismo; tute freŝdate ankoraŭ, oni eksciis, ke la dogantarifoj sur la kotonaĵoj ĉe ilia eniro en Hindio estas altigitaj, en la nova buĝeto, de 15 al 20%. Ekster la registaraj rondoj de Delhi, aktiva agitado estas ekkomencita en la lando kontraŭ la fremdaj, precipe anglaj teksaĵoj. La reago de l' revulo Gandhi kontraŭ la moderna maŝinismo, kiu senposedigis la malgrandajn metiistojn en Hindio, koincidis ĉi tie kun la ambicioj de l' riĉaj hindaj manufakturistoj, kvankam ili uzas tiun ĉi saman maŝinismon, k kondukis al fortega tendenco de ekonomia fremdul-malamo.

Gandhi antaŭdiras la revenon al la



GANDHI

radŝpinilo por ŝpini k al la manteksilo por teksi; li admonas siajn disĉiplojn vesti sin nur per la *kadar*, kruda teksaĵo fabrikita per tiuj ĉi primitivaj rimedoj; k li kontraŭstaras al ĉiu perfort-apliko. Tio ne malhelpis la naciistajn volontulojn, en oftaj okazoj, sin fordoni al perfortaĵoj kontraŭ la marĉandistoj, kiuj vendis ankoraŭ kotonaĵojn de Lenkŝiro, ekbruligi ĝojofajrojn sur la publikaj placoj per amasoj da angla teksaĵo, k devigi fine la bazarojn fermiĝi. Tre supozeble estas vera la onidiro, ke tiu ĉi tuta movado organizita kontraŭ la brita komerco, kun kontrol-pikedoj, minacado, bastonbatoj k tranĉilpikoj, estas subtenata per la monrimedoj, kiujn disponigas al ĝi la grandaj hindaj posedantoj de ŝpinejoj k teksejoj. Tiel, depost sufiĉe longa tempo, sed precipe depost dekdu monatoj, kiam Gandhi komencis sian marŝon al la maro por inaŭguri la agitadon nomatan "civitana malobeo", atakante precipe la sal-monopolon, la deponejoj de anglaj teksaĵoj en Hindio apenaŭ plu forvendas siajn produktojn, k multaj mendoj estis prokrastitaj.

Tiu ĉi aspekto de l' ekonomia milito en Hindio kontraŭ Anglio estas unu el la demandoj, kiuj okupis la vicreĝon, lordon Irvin (Irwin), dum siaj intertraktadoj kun Gandhi fine de februaro, el kiuj rezultis la akordo, kies teksto estis proklamata la 5-an de marto. Estis decidite, ke la kontrol-pikedoj povus daŭri, kondiĉe ke ili ne havu perfort-karakteron *(peaceful picketing)*; ankaŭ oni interkonsentis pri ĉesigo de l' bojkoto al fremdaj produktoj "tiom, kiom ĝi konsistigas propagandon politikan"; sed evidente, ĝi daŭros, pli intense, sub la aspekto de pure ekonomia movado. Intertempe la angla publiko, eĉ la konservativa, kiu estis unue kontenta pri la rezultoj de l' traktadoj Gandhi-Irvin, baldaŭ ree maltrankviliĝis, kiam oni aŭdis pri la rezulto de l' unua kontakto inter Gandhi k la riĉaj komercistoj de Bombe (Bombay).

Efektive la hindaj manufakturistoj k Gandhi interkonsentis por ellabori planon, kiu devas likvidi ĉiujn anglajn teksaĵojn deponitajn en Hindio k fermi la pordojn de l' lando al novaj importadoj de tiuj produktoj. Societo formiĝos, je la kostoj de tiuj komercistoj, tenantaj la anglajn provizojn, por forvendi tiujn ĉi teksaĵojn ekster Hindio, k al tiu societo estos allasataj nur la komercistoj, kiuj devigas sin ne

[1] Hindia mon-unuo = ĉ. 5 dolaroj.

plu aĉeti fremdajn produktojn. Alivorte tio signifas, ke la celo de l' indiĝenaj kapitalistoj ne estas la protektismo, jam tre disvolvita por ilia profito, sed... vera forteno de l' manufakturaj varoj venantaj el fremdlando k la likvido de l' entreprenoj fonditaj de fremduloj en Hindio. Je la nomo de la *naciaj interesoj* oni favoras kelkajn spekulaciistojn: la hindiaj amasoj estas invitataj, *je la nomo de l' naciismo,* pagi por riĉigi malgrandan bandaĉon da individuoj.

Dume la senlaboreco kreskas daŭre en la Lenkŝira regiono de Anglio. Dum Lenkŝiro povis sendi al Kalkuto en lasta januaro nur proksimume 150 pakegojn da hinda teksaĵo nomata "dhuti", Japanio transsendis 4000 pakegojn da ĝi en tiun urbon. Ĉefe bojkotata estas fakte la angla importo, k la Lenkŝira teksindustrio suferis komercan perdon de 60% en Hindio dum la periodo de aprilo ĝis decembro 1930. De nun la duelo komencita inter la industriaj k komercaj interesoj anglaj unuparte, k la deziregoj de l' hindaj kapitalistoj, kiuj grupiĝis ĉirkaŭ la granda nacia asketo, aliparte, eniris sian decidan fazon. Kaj la naciisma popolmovado en Hindio estas efektive la plej forta apogo por la hindaj kapitalistoj en tiu ilia ekonomia k... politika batalego.

Certe, kiu ajn venkos el ambaŭ kontraŭuloj en tiu ĉi batalo, la proletaro hindia restos ĉiam same subpremata k ekspluatata. La sola savo por ĝi kuŝas en la senpera klasbatalo, en ĝia grupiĝo ĉirkaŭ fortaj sindikatoj k organizado de ĝia liberiga batalo komune kun la laboristaro tutmonda. *Laŭ div. fontoj kompilis Bora.*

Raciigo en la angla karb-industrio

Samkiel ĉiuj aliaj industrioj, la karb-industrio nuntempe travivas kompletan reorganizadon, k studo de la procezo elmontras interesajn kontrastojn kompare kun la antaŭaj administraj metodoj.

La karb-entreprenistoj, oni devas bone scii, troviĝas inter la plej konservativaj el niaj[1] industriistoj, sed la premo de nuntempaj ekonomiaj cirkonstancoj devigas ilin kooperi por trovi solvon en siaj malfaciloj. Ili vekiĝas ĉe la fakto, ke ne plu ili povas ignori la ekziston de aliaj samindustriistoj k ke kunlaborado alportas reciprokajn avantaĝojn. La rezulto de tiu ekpenso vidiĝas en la multaj trustoj nuntempe starigataj en la lando.

En mia distrikto estis ses kompanioj prilaborantaj preskaŭ dudek minejojn. Dum la lasta jaro ili kunfandiĝis en unu trusto "La Manĉestraj Minejoj" k nuntempe estas prilaborataj kiel unu firmo. La unua efiko de ĉi tiu kuniĝo vidiĝas en la plia uzo de maŝinaro. Aliaj efikoj estas la malmultigo de la laboristoj k la pli monŝpara funkciigo de l' ekzistantaj aparatoj k ejoj.

Malmodernaj elfosmetodoj flankenŝoviĝas antaŭ la elfos- k forportmaŝinoj. Ĉiam pli k pli uziĝas la maŝinpioĉoj. Motorforportiloj anstataŭas azenojn k homojn.

Pli granda atento estas donata al la "akcesoraĵoj". Ekzemple, la argilo elfosita dum domkonstruado miksiĝas kun la senvaloraĵo elprenata el la karbminejo k fariĝas brikoj. Rezultas el tio, ke la trusto ankaŭ estas la plej granda domposedanto en la distrikto.

[1] T. e. britiaj. — *Red.*

Roko elfosita multe uziĝas por novaj vojoj, k la rubaĵo profite vendiĝas por ĝardenvojetoj k tenisejoj.

La pliuzo de maŝinoj kompreneble pliigas la produktopovon, k ankaŭ plivalorigas la akciojn — ankaŭ ĝi pliigas la senlaborecon. La "bonŝanculoj", kiuj havas laboron, estas devigataj labori por malpli alta salajro, sed devas produkti pli ol antaŭe. La rezulto de tiu plirapidigo vidiĝas en jena statistika tabelo, publikigita de la Registara Inspektoro de Minejoj:

1929 mortis (subtere) . .	985	laboristoj
1928 mortis	885	laboristoj
1929 difektitaj estis . .	162 230	laboristoj[1]
1928 difektitaj estis . .	149 132	laboristoj[1]

Laŭ statistikoj, la maŝin-elfosistoj pleje suferas akcidentojn. Ŝajne la novaj metodoj elmetas la laboristojn al pli da danĝeroj ol la antaŭaj.

La elfos-maŝinoj, krom malfortigi la ĉirkaŭan karbon, ankaŭ malfortigas la plafonon. Ĉar plafono konsistas el danĝera argileca aĵo nomita "klod" (clod), kiu ofte disfalas for de la supra tavolo, do necesas ke ĝi korekte estu sekurigata. Ĉi tiu *klod*-o estas subtenata de la karbo mem, ĝis lignaj ŝtipoj estas enmetataj. Do post kiam la maŝino pecigis la karbon, restas danĝera plafon-etendaĵo nesubtenita, ĝis la momento kiam elpreninte la karbopecojn oni povas enfiksi lignaĵojn. La ministo do devas labori sub enfalema plafono, k facile okazas, ke eltirante karberon, oni surfaligas la plafonon.

Eble sekvanta statistiko parolos pli elokvente. La plej granda nombro da mortoj k difektiĝoj troviĝas sub la rubriko "plafonfaloj". Depost 1920 la mortoj pro tiu kaŭzo atingis 5193 k difektiĝoj 538 633 (almenaŭ tritagdaŭraj). En 1929, pro plafonfaloj la nombro da mortintoj estas 581 k difektitoj 61 910 — alivorte: el 23 mortigitoj ĉiusemajne en 1929 la duono estis sekve de plafonfaloj.

Plia risko ekzistas pro la elektro uzata por funkciigi maŝinon. Eliĝu fajrero el malbone izolita elektrofadeno, k la ĉiam estantaj gasoj k karbopolvo estigas eksplodon, k denove estas "sango sur la karbo".

Laŭ "Plebo" (nov. 30) trad. L. B. (Leeds).

[1] Estas kalkulitaj nur tiuj, kiuj ne povis labori dum almenaŭ 3 tagoj.

Raciigo en la konsumado

Estas jam konate, ke la gvida direktilo en la hodiaŭa ekonomia vivo estas raciigo de la produktado; de ĝi atendas la kapitalistoj pli altajn profitojn por si. Kio koncernas la laboristan klason, ĉi tiu rigardas al ĝi kiel al neevitebla fenomeno, ligita kun la teknika procezo de la produktado. Estas ankaŭ konate, kiel la raciigo efikas sur la produktadon kaj ĝian procezon. Per tio ke ĉi tiu meĥanike sin konstante ĉiam pli kaj pli disvolviĝadas, la laboristo fariĝas laŭgrade la sklavo de la maŝino. Ofte li ne scias, al kio servas tio, kion li produktas. Sekve de tio perdiĝas lia intereso pri sia laboro, kiun li plenumas nur pro tio, ke li devas konservi ne nur sin mem, sed ankaŭ sian familion.

Pro tio stariĝas la demando, ĉu la eventuala profito rezultanta por la laboristo el la raciigo de l' produktado, egaliĝas la efektivajn valorojn el ĝi rezultantajn. Se al la laboristo estas forprenata ĉe la laboro la ebleco valorigi sian individuan laboron per tio, ke li estas trudata fari precize elmezuritajn, de la laborprocezo antaŭe difinitajn movojn, tio signifas plistultigon de lia pensado. (Rim. de l' trad.: Tio ĉi estas vero en plena senco de la vorto. Tial ke mi mem tion spertis: mi ne estis kapabla pensi pri io alia ol nur pri tio, kion mi produktis.)

Nun estiĝas la demando, ĉu en tiu stato por la laboristo la nuna okhora labortempo regata de l' raciigo ne estas pli laciga laborado, ol la antaŭa pli longa labortempo, kiam la laboristo havis eblon valorigi ĉe l' produktado plene siajn individuajn kapablojn?

Sed la tasko de ĉi tiu artikolo estas

Por relative tre modera sumo
vi povas akiri libron de daŭra valoro:

PLENA VORTARO DE ESPERANTO

La unika lingva konsultilo por ĉiu esperantisto!

536 paĝoj. Form. 14×20 cm.
Prezo: bindita 10 mk. g., broŝ. 9 mk. (afrankite).

SAT *23, rue Boyer, Paris XX, aŭ Colmstr. 1, Leipzig O 27.*

patrino ne fordonu lin en orfejon. Kaj Semke ploras k ĉirkaŭprenas la kolon de la patrino.

Kiun restigi?

Ŝi meditas k pripensas k la koro kvazaŭ formortas pro doloro.

— Patrino! unu infano ekkriis eldorme; tio ŝiris la patrinan koron, k ŝi ekploregis ... k la vento ploras k frapas kontraŭ la fenestrojn.

Z. Libin.

El juda lingvo tradukis *S. Guterman.*

LA NEĜO DEGELAS

Kiam ekdegelas la neĝo, ni sentas la alproksimiĝon de la printempo. Ankoraŭ ja estas vintro, la temperaturo malalta, sed la frosto venkita. La naturo vekiĝas el sia rigido. Baldaŭ formiĝas marĉetoj en la stratoj, mola malseketa neĝokaĉo kovras la irejojn, el ĝi poste iĝas bruna malpuraĵo trapenetranta eĉ la plej rezistokapablajn botojn. Tamen en la aero flustras io nedirebla, iu sekretoplena potenco, kiu nin esperigas k detruas nian rezignemon. Gutoj k glacieroj falas de la tegmentoj, la homoj vadas en koto sur la trotuaro, sed stranga, dolĉa venteto kaptas la senton: ni *scias*, ke nun venos pli agrabla sezono, kvankam ĝi ne estas videbla.

Ĉio ĉi memorigas pri simila stato en la mondpolitiko. La glacio de maljusta sociordo jam ekkrakas, la katenoj de l' kapitalismo tie k tie ekkrevas aŭ malfirmiĝas. Sed kiel al la natura vintro ne tuj sekvas la printempo, tiel ankaŭ la ekmortantan kapitalismon ne senpere anstataŭas la socialismo. Inter ambaŭ ŝoviĝas la epoko de la degelado, de la krevado, de la malfacilaĵoj. Same kiel miloj da manoj laboras por forigi la neĝamasojn, ni devas batali kontraŭ la malhelpaĵojn de la interepoko; nur poste ni atingos la celon. Ankaŭ politike montriĝas antaŭsignoj de renverso, nova spirito ekventas tra la mondo. Ankoraŭ regas la fiordo, sed nedifinebla certo influas nin, ke la liberiĝo, la printempo por la homaro, jam estas survoje. Enmeze de la plej mizeraj cirkonstancoj nin tuŝas la freŝa spiro de nova tempo. Ni ne povas pruvi tion, sed ni estas konvinkitaj, ke ĝi nepre efektiviĝos. Feliĉaj ĉiuj, kiuj vivos tiam! F. S. (16 462).

AL KOMENCANTOJ!

La vivo nek staras nek haltas: por esti vere vivanta, ankaŭ *vi* ne staru, ne vegetu. Kiam planto ne plu kreskas, ĝi jam ekvelkas. Tiel en Esperantio: vi devas aŭ progresi aŭ malprogresi; do, zorgu, ke vi ne malantaŭeniru!

Eble vi enuas, la cerbo eble lacas (pro tro severa studado oni esperas, sed ne kredas), k vi imagas, ke post kelkmonata ripozo vi povos pli energie ataki esperanton. Jes! sed de la komenco; ĉar, se vi atendos tro longe, forlasos vin via pene akirita scipovo. Eble vi estas krome tro okupata, k lasas portempe tian bagatelon. "Poste", vi diras, "mi denove studos esperanton serioze k profiteme". Tempo flugas, aliaj interesoj intervenas, k esperanto estas tute forgesata.

Tiam, iun tagon aperas fremdulo, portanta sur la brusto la verdan stelon, insignon, k ĝoje li salutas vin (pro via insigno, kiun vi forgesis forigi, aŭ kiun vi portas pro parademo). Kaj kion vi diros? vi certe komencos, aŭtomate per "Bonan tagon, K-do", sed post "ne tiel rapide ... mi ne tute ... mi tute ne ... ktp." vi flustros "ĝis la revido" k marŝaĉos for en ruĝiĝa konfuzo.

Ne atendu tian malfeliĉaĵon! Sed atentu nun, prizorgu vian lingvoscion! Ekzercadu ĝin per: —

LEGADO: vi legas mian artikolon.

PAROLADO: vi nun kritikas ĝin.

SKRIBADO: do, skribu vian propran provon.

Lajla Brajmer (16 810), kiu, mem unuajara lernantino, verkis tiun artikoleton por la murgazeto de l' Edinburgaj K-doj.

EN APRILO

Printempiĝis, plivarmiĝis,
Brilas gaje sun',
Neĝ' degele eklarmiĝis
Kaj malsanas nun.

Jes, alvenis por vi, vintro,
La plej certa mort'
Al mi tedis vidi vin tro
Ofte sur la kort'.

Iru for vi, malbonido,
Kune kun malgaj'!
Mi salutas vin, ĝojido,
La venonta maj'!

G. F.

Lacaj — tamen kuraĝaj k obstinaj

(Laŭ Bobinska: P i o n i r o j)

Resumo de l' antaŭaj ĉapitroj: Sur insulo, en la mezo de granda lago, estas izolitaj tri geknaboj (Vanka, Katka, Juk). Ili ricevis la komision de la gvidantoj de junpionira tendaro, kiu troviĝas sur la bordo de l' sama lago, elserĉi k rekonduki en la tendaron perboate forkurintan knabinon. Ne havante eblon reveni, ili per lumsignaloj de du grandaj lignoŝtiparoj ekbruligitaj provas alarmi la tendaranojn. Dume la tri infanoj sentas laceĝiĝon pro la peza laboro de ili plenumita.

— Ho! mi mortas! plendis Juk, kion fari, se ĝi estingiĝis denove!

— Meti[1] novajn branĉojn, diris Vanka. Se tiuj ŝtiparoj estingiĝas, ni estos denove deŝir-

itaj[2] de l' tendaro, k morgaŭ necesos rekomenci.

— Ĉi pensas, ke neniu venos por nin serĉi? Juk havis kompatindan mienon.

— Ni devas antaŭvidi ĉion.

— Vi scias, tiu ĉi flamo estas kiel krio en la nokto, diris Katka. Kuŝanta[3] sur la ventro, ŝi fikse rigardis la fajron per siaj larĝe malfermitaj okuloj.

— Ĝuste tion ni volas: ke ĉi tiu krio ĝisatingu ilin, en la tendaro.

— Kaj se ili ne aŭdus ĝin?

Tiuj ĉi forlasitoj pensis pri la sekvanta tago pli peniga[4] ankoraŭ, kiu estis rezervita al ili. La nutraĵo elĉerpiĝadis[5]. La ardaj karboj konsumiĝis.

— Kial ni ne kunprenis terpomojn? ĝemis Juk; oni estus kuirinta ilin.

— Da similaj "kial ne" ni trovus multajn[6], mia kara, interrompis[7] lin Vanka.

— Oni povus kapti fiŝojn morgaŭ k ilin friti.

— Tiam necesis provizi sin per kaptiloj[7], denove maltrankviliĝas Juk.

— Juk, ne estu citrono, diris al li severe Katka, memoru, ke pioniro devas ĉiam esti kuraĝa, gaja k neniam senkuraĝigita[8].

— Sed mi estas kuraĝa k gaja, defendis sin Juk, mi estus ankoraŭ multe pli kuraĝa post bona vespermanĝo!

— Rigardu prefere, ĉu oni nenion vidas ĉe la horizonto!

Juk leviĝis k falante de unu kruro sur la alian, kiel estis lia kutimo, direktis sin al la bordo.

La du aliaj rigardis la mortantajn karbojn k poste interŝanĝis rigardon. Necesos leviĝi k rekomenci labori[9]. Katka estis kuŝanta sen fortoj, sed preta ekstariĝi ĉe la unua alvoko donata[10] de Vanka. Ŝi sciis, ke Vanka ankaŭ estis tre laca, sed liaj nigraj okuloj brilis per severa k decida eklumo k la okuloj de Katka reflektis tiun ĉi lumon.

— Ni ne permesos al ili[11] estingiĝi, ŝi pensis kun persista obstinego.

---

[1] Aŭ: amasigi. [2] Aŭ disigitaj, malligitaj, izolitaj, malkontaktigitaj. [3] Oni povas pense kompletigi: Estante kuŝanta..., ŝi... (temas pri *stato*, ne pri *ago*); tamen la formo: "kuŝante" ne estas malkorekta, se oni volas akcenti la samtempecon de l' kuŝado k rigardado (= *dum* ŝi kuŝis, ŝi rigardis...). [4] Aŭ: streĉa. [5] La sufikso "ad" (kvankam ne nepra en tiu ĉi frazo) karakterizas taŭge la iompost-ioman (laŭgradan) elĉerpiĝon (forkonsumiĝon) de l' provizaĵoj. [6] En pli normala formo la frazo tekstus: "Ni trovus multajn (aŭ: multe) da similaj..." [7] Aŭ: fiŝhokoj, -ŝnuroj. [8] Aŭ: animpremita. [9] Aŭ (per substantivo): la labor(ad)on. [10] Aŭ: farata (eligata). [11] Nome: la (ligno)ŝtiparoj.

ANEKDOTOJ

Mark Tŭen (Tvain) k la trustoj

Usona ĵurnalisto iufoje demandis al Mark Tŭen pri la kaŭzo, kial la granda ŝercemulo estas malpopulara inter la gvidantaj sinjoroj de la trustoj.

Mark Tŭen montris senkulpan mienon k diris: "Mi ne scias la kaŭzon. Sed eble tio dependas de mia aŭtoreco."

"Tion mi ne komprenas."

"Nek mi ankaŭ. — Sed mi havas malklaran antaŭsenton, ke la kaŭzo estas rakonteto, kiun mi skribis en gazeto."

Li transdonis al la ĵurnalisto gazeton, kiu enhavis rakonteton. Ĝi estis nomata: "La tri muŝoj", k la teksto estis jena:

Muŝpanjo havis du filinojn, kiujn ŝi multe amis. Iun tagon, dum ekskurso, ili alvenis en sukeraĵejon. "Panjo, permesu al mi gustumi la belan ruĝan karamelon," petis unu el la junaj filinoj. La muŝpatrino donis la permeson, k la muŝfilino kun ĝojega mieno sidiĝis sur la belan ruĝan karamelon. Subite ŝi etendis siajn flugilojn k falis mortinta al la planko. La ruĝa karamelo nome estis venena, ĉar ĝi estis el la usona karameltrusto. La muŝpatrino nun havis do nur unu filinon, k ĉi tiun ŝi nun amis tiom pli multe. Iun tagon la filino havis nevenkeblan deziron manĝi kolbason. La patrino kondukis ŝin al viandbutiko, sed la muŝo apenaŭ ekmanĝis tre malgrandan pecon de la kolbaso, kiam ŝi ekmortis pro konvulsi-atako. La kolbaso nome estis venena, ĉar ĝi estis fabrikita de la usona kolbastrusto. La kompatinda muŝpanjo tiam estis ekkaptita de malespera funebro. Ŝi tute ne plu volis vivi, k por rapide esti mortigata ŝi flugis k sidiĝis sur muŝpaperon. Sed la morto ne sekvis. La muŝpapero nome estis sendanĝera, ĉar ĝi estis fabrikita de la usona muŝpapertrusto.

El la sveda kooper-gazeto "Konsumentbladet" trad. 12 286.

Entreprenista kalkul-metodo

Laboristo petas la ĉefon plialtigi la salajron.

— Ho, diras la entreprenisto, vi ne sufiĉe laboras por mi. Priprensu, dum 1/3 de la tago vi dormas, tio estas dum jaro 122 tagoj. Dum alia triono vi refreŝigas vin (studas, legas ktp.), ankaŭ tio estas 122 tagoj. Restas 122 tagoj. El tiuj dekalkulu 52 dimanĉojn. Restas 70. Sabate vi laboras nur duone. Ankoraŭ estas 44. Dum la jaro vi feriis 44 tagojn, 9 tagoj estis festotagoj, dum kiuj vi ne laboras. Restas 21 tagoj. Kaj tri semajnojn vi estis malsana.

Konsentante la laboristo jesas la mizeron de l' kapitalisto. "Volonte" li redonus la duonon de la salajro, por ke la ĉefo povu forigi la ekonomian krizon.

Alfr. Winkler (12 467).

VORTOJ DE K-DO E. LANTI
Ĵus aperis. 192 p. Prezo 2 mk. g.
SAT-Administrejo Leipzig O 27.

KIEL MI FARIĜIS ESPERANTISTO

Estis en la jaro 1927, kiam mi aŭdis la esperantan lingvon parolatan de kelkaj K-doj. Tiutempe mi ankoraŭ ne sciis, kian valoron la lingvo havas. Mi laboras en ŝtat-fabriko kiel seruristo; post du monatoj mi devis ŝanĝi mian laborlokon pro iu laboro. En tiu ĉi laborgrupo, al kiu mi estis veninta, mi trovis du komencantojn, kiuj vizitis esperantan kurson.

Kun la pli juna K-do mi komune laboris; li ankaŭ instigis min partopreni la kurson. Mi ne longe pripensis la aferon k tuj komencis lerni nian lingvon. Post kelka tempo mi jam sukcesis en la studo; mi renkontis en jaro 1928 eksterlandanojn (el Londono k el Hungario). Mian tutan scion mi uzis por komprenigi miajn demandojn k dezirojn; tiam mi jam konsciis pri la valoro de esperanto.

En jaro 1929 mi ankaŭ vizitis la junularan renkontiĝ-feston en Vieno; tre bele pasis la tempo, mi havis sufiĉan okazon interparoli kun eksterlandanoj. Duope ni ankaŭ mendis la gazeton SENNACIULO, ĉar sen legado oni ne povas sukcesi; ĉiusemajne mi legas la gazeton por perfektiĝi en la lingvo; k baldaŭ mi estos membro de SAT.

Lanzenlechner, St. Pölten.

POR NIA DISTRO

Solvoj el la antaŭa n-o:

Nom-enigmoj: Hero/o; Hero/doto; H/akilo; S/ireno; I/z/abelo; Salo/mono.

Ŝercenigmoj: 28. Mus-kato (muskato). 29. Mus-kolo (muskolo). 30. Kiam li estas not-ario (notario).


Novaj nom-enigmoj

Trovu vortpartojn k kombinu ilin laŭ jena maniero:

	Kaj vi ricevos jenon:
13. Reganta estaĵo de l' mondo + enmetita antaŭ fino vorto, signifanta *parteton.*	faman antikvan poeton-kantiston
14. Kruela reĝo (malamiko de infanoj) + konsonanto antaŭ la lasta silabo	nomo de neŭtrala esp. ĵurnalo
15. Vira nomo. Ŝanĝu la antaŭlastan literon	interrompon
16. Vira nomo + nova socialista esp-lingva revuo (antaŭ la fino)	lacerton
17. Natura ega akvujo + vokalo antaŭ la fino	virinan nomon
18. Trinkaĵo uzata en varma stato + ½ de prepozicio + kara metalo	viran nomon
19. Io malpli ol teruro + la sama varma trinkaĵo	viran nomon

T. Dajber.

Humoro



En la stacidoma restoracio

— Kelnero, kial mia porcio estas multe pli malgranda ol tiu de l' sinjoro?

— Ĉar via vagonaro forveturas kvin minutojn pli frue!

La mallarĝa vojo

"Mia frato", demandis la predikisto, "ĉu vi promenas sur la malfacila, mallarĝa vojo?"

La alparolito diris nenion, sed transdonis sian nomkarteton, sur kiu estis legebla: SINJORO BALANCO, ŝnur-dancisto. *(15 262.)*

*

Petro: Kia diferenco estas inter vi k inventisto?

Karlo: ... mi ne scias!

Petro: Sekve, vi estas ulo sen scio, t. e. sensciulo, dum inventisto estas scienculo.

Karlo: Prave, sed ankaŭ inter vi k inventisto estas diferenco.

Petro: ......?

Karlo: Nu, vi estas ŝercanto, dum inventisto estas serĉanto. *(5479)*

En lernejo

Instruisto: Tradicia nomiĝas tio, kio estas transdonata de generacio al generacio, de patroj al idoj. Nu, donu ian ekzemplon!

Mihaĉjo: Mia pantalono. *M. M.*

Bona aspekto

Elza: Ĉu ne ŝajnas al vi, knabinoj, ke plenbarbo plibonigas la aspekton de mia fianĉo?

Liza: Jes, ĉar lia vizaĝo nun estas malpli videbla. *(12 286.)*

La koro de milionulo

Al malbonfarta milionulo oni venigas kuraciston. Tiu ĉi zorge esploras la malsanulon k fine diras:

— Vi havas nenian difekton, sinjoro. Via koro bonege funkcias.

— Nu, mi ĝin malofte uzas. *M. M.*

SENNACIULO devus esti abonata de ĉiu lab. esperantisto en la tuta mondo. Per Sennaciulo li ligiĝas mondskale kun siaj laborfratoj, ricevas signifon realan lia esp.-studo.

(Eldonkvanto 10 000 ekz.)

6-a JARO. N-o 4 MONATA ALDONO AL SENNACIULO 16. IV. 1931

La Lernanto

REDAKTEJO: 14, av. de Corbéra, Paris XII-e ★ ADMINISTREJO: Kolmstrato 1, Leipzig O 27

KIUN EL ILI?

Vintra nokto. La pala vidvino ekdormis ĉe sia laboro, tirante la kudrilon. Jen pormomente ŝi vekiĝis, permane ekfrotis la okulojn komencante ree tiri la kudrilon. Ŝi ne povas: la fingroj ne fleksiĝas. La kapo defalas, la koro svenas pro malforto. Ŝi ne povas. Ŝi ellasas la kudrilon el la mano.

Sur liteto apud la tablo dormas ŝiaj infanoj: 3 palaj kadukaj orfoj de formortinta cigaredfaristo kuŝas envolvitaj en ĉifonoj alpreminte sin unu al la alia. Oni vidas nur tri palajn vizaĝetojn, kiuj supozigas, ke ili estas mortaj.



Infandesegno

La patrino ĉesas labori. Ŝi enrigardas la fornon, k kiam ŝi rimarkas, ke la fajro forbrule estingiĝis, ŝi pene k profunde ekĝemegas, alpaŝas al la lito k pli zorge kovras siajn infanojn.

Jam estas malfrue en la nokto, sed ŝi ankoraŭ ne kuŝiĝas, kun malĝoja patrin-dolora rigardo turnita al la infanoj ŝi staras enprofundiĝinta en pensoj.

Ekstere estas ventego. La uragano disverŝiĝas kun konstanta plorado, kvazaŭ miloj da demonoj k spiritoj veplorus pri iu formortinta sia estro, pluvego frapas kontraŭ la fenestrojn k la ladon de l' tegmento. La tuta ruinaĵo tremas; ŝajnas, ke jen ĝi disfalas k superŝutas la mizerulojn suferantajn inter ĝiaj muroj mallumaj k malpuraj.

Kion pensas la vidvino? Per siaj profitoj ŝi ne povas subteni k nutri la tri infanojn; la malsatmorto enpuŝiĝas al ŝi tra la pordo. Ŝi ne povas ĝin forpeli per siaj fortoj. Du infanojn ŝi estas devigita fordoni en iun orfejon, unu ŝi retenos al si. Kun unu infano ŝi iel travivos per siaj malmultaj perlaboraĵoj... ŝi devas tion ĉi fari pli rapide... aliel ŝi falos pro fortomanko, ŝi laboras super siaj fortoj... ŝi ne eltenos... k la patrino staras meditante, kiun el la tri ŝi retenu al si, k kiujn fordonu? ...

Ŝi rigardas al siaj infanoj, ŝia koro disŝiriĝas pro profunda, profunda doloro k ne povas decidi... ŝiaj rigardoj flugas de unu infano al alia, ŝi ilin ĉiujn egale amas, ŝia koro fendiĝas pro kompato, ŝi ne scias, kiun ŝi fordonu. Rigardante al la dormantaj infanoj, ŝiaj bolaj patrinaj larmoj komencas iom post iom deguti al iliaj palaj vizaĝoj.

La infanoj jam scias, ke du el ili oni forprenos de la patrino: ili subaŭskultis la interparolojn de la patrino kun la parencoj. Kaj la infanoj petas, ke ŝi ilin ne fordonu. Ili rigardas ŝin per timemaj okuletoj, kisas k ĉirkaŭprenas ŝin, k ĉiu infano petas por si:

— Patrino, min ne fordonu.

— Patrino, mi restos ĉe vi.

— Patrino, mi...

— Patrino, mi...

Rajzele promesas, ke ŝi ne plu petos manĝaĵon, Berele estos bona k neniam plu estos malobeema, nur la

montri al la kontraŭa poluso de l' ekonomia vivo, al poluso ne malpli grava, sur kiu baziĝas la tuta produktado, al la konsumado de la produktita varo aŭ komercaĵo. Kaj ĉi tie ni tuj kontraŭstaru malagrablan fenomenon, fortege frapantan en la okulojn. Dum la produktado raciiĝas ĉiuflanke, ekregas en la konsumado tutplena ĥierarkio. Oni produktadas ĉion eblan, sen pripenso, ĉu estas zorgate sufiĉe pri l' konsumado, por ebligi al ĉiu homo pasigi indan, decan vivon. Oni produktadas luksajn frandaĵojn, spite tio, ke ne estas priatentata la malriĉa homo kaj lia ĉiutaga pano. Oni produktas luksajn vestaĵojn, malgraŭ ke la laboristo ne havas rimedojn por provizi sin kaj sian familion per la plej necesa simpla vesto. Por bonloĝado al riĉuloj oni konstruas kaj instalas komfortajn loĝejojn, sen zorgo pri iomete deca loĝado por la laboristoj, kaj tiel ni povus senfine daŭrigi . . .

La raciigo de l' konsumado havas en iu rilato samajn efikojn, kiel la raciigo de l' produktado. Certe la mallongigo de la labortempo estas la efiko de l' superproduktado de difinita speco da varoj.

Kiel jam dirite, hodiaŭ oni produktas senplane, kaj tio estas la ĉefaĵo; oni produktadas la varojn por alta vivnivelo; ili restas neutilaj por la ĝenerala vivbezono; ili servas nur por la laŭgusta kontentigo al supera homklaso. Legioj da laboristoj estas okupataj per la produktado de varo, kiu por kulturita homo estas tute ne uzebla kaj senutila. Tiel oni celadas unuflanke firme ekŝpari per raciigo produktokapablajn homajn fortojn, kaj malŝparas aliflanke per produktado de nebezonataj varoj.

Kiel jam dirite, la raciigo de la konsumado povos havi la saman efikon kiel tiu de la produktado. Ni tion ekvidos pli klare per jena ekzemplo: Ni diru, ke en iu difinita ekonomia Ligo, kiu plene sin mem kontentigas, de neniu dependas, vivas milo da homoj. El tiuj 1000 homoj estu 800 okupataj ĉe produktrimedoj, kiuj kreas bezonojn por pasigi kulturan vivon; el restantaj 200 homoj 100 estu okupataj per produktado de senbezonaj valoroj. La resto laborus en la komercaj fakoj ktp. Ĉiuj laborantoj estu okupataj per okhora labortempo tage.

Kaj nun ni supozu, ke ni atingos forigon de l' produktado de luksa varo kaj ke la laboristoj okupitaj per ĝia produktado transiros al la produktado de aliaj artikloj. Jam antaŭe tiuj ĉi artikloj de l' vivbezono estis produktataj en sufiĉa kvanto; tial povos okazi, ke post forigo de l' nebezonata varo kaj nuligo de ĝia produktado tiu ĉi senlaboriĝinta laboristaro servos nur al celo, mallongigi la labortempon por ĉiuj je unu horo tage. Povos esti enkondukata sephora labortago sen iu difekto por la ekonomia vivo. Nur la luksa varo malaperis el la mondo, varo, kiu bezonas multe da prilaboro kaj da homa ŝvito kaj alportas nenian utilon.

Ne estas imageble, ke la raciigo de l' konsumado fariĝu sub la hodiaŭ reganta privatkapitalista sistemo en produktado. Tio estos unu el la nunaj taskoj de produktanta sistemo, kiu superregos post la kapitalismo. Ĝian komencon ni jam vidas en la kooperativa produkt-sistemo, kiu estas bazita sur socialistaj principoj.

Nur tiu ĉi produkt-sistemo, ne baziĝanta sur la principo de persona profito, sed sole atentanta pri la prospero de l' laborista klaso, estas kapabla organizi trafe la konsumadon kaj tiel redoni al la produktado k r e a n armeon el laboristoj, kiuj hodiaŭ okupiĝas ĉe produktado de malutila varo, servanta al diboĉa vivo de tiuj, kiuj regas la produktadon kaj la komercon.

Inĝ. S m e t a n a en "Vienaj Ĉeĥaj Lab. Folioj". Trad. K n o u r e k (2474).

LA PAMIR-EKSPEDICIO EN 1928

En la centra montar-ĉenaro de Mezazio, kie tuŝiĝas la limoj de USSR, Hindio, Ĉinio k Afganio, prezentiĝis ĝis antaŭ nelonga tempo blanka makulo sur la landkartoj: la altlando de Pamir, la tegmento de la mondo. Nur en jaro 1928 la Rusa Akademio de Sciencoj kune kun la Koopera Unuiĝo de Germanaj Sciencoj k la Germania k Aŭstria Alp-Unuiĝo organizis ekspedicion por esplori tiun nekonatan regionon. La rusa filmasocio "Meĵrabpom" akompanis la ekspedicion k filmis la plej interesajn scenojn.



Loĝantoj de l' Pamir-montaro

La ekspedicio estis ekipata dum junio 1928 en la malgranda Uzbekia urbo Oŝ. La filmo montras la formarŝon kun 200 ĉevaloj, 250 kameloj k abunda pakaĵaro. Penega estis la vojo, unue tra la stepo, poste trans altaj montpasejoj k la bestoj devis grimpi eĉ sur krutaj neĝdeklivoj. Kelkfoje homo aŭ ĉevalo falis k glitis malsupren, sed feliĉe la tuta karavano atingis la larĝan valon Alaj. Tie troviĝas la paŝtejoj de la kirgizoj, sukaj herboj kreskas en alto de 2—3000 metroj super la nivelo de l' oceano. Je honoro de la fremduloj la indiĝenoj okazigis feston, pro kiu kunvenis la enloĝantoj de la tuta valo. Distancoj de 50 kilometroj ja ne multe signifas. La soveto de la Alaj-valo salutis la esplorantojn, dignaj figuroj k strangaj tipoj, kiuj verŝajne la unuan fojon staris antaŭ la filmkamero. La kirgizoj aranĝis vetrajdadon, plue kiel kulminacion de l' festo batalon pro morta ŝafo. Tiu, kiu kaptas ĝin, estas persekutata de la aliaj k la venkanto devas ĝin redoni al la ludjuĝanto.

Parto de la ekspedicio nun pluen iris al la neesploritaj legendaj valoj. Sur la postsignoj de iamaj karavanoj oni trovis ostojn per la tropika sunbrilado en sablo blankigitajn. Ĉe la lago Karakul, 4200 m, estis starigata la dua tendaro. De tie la scienculoj vagadis en la ĉirkaŭaĵon. Amasan akiron gajnis la zoologoj, maloftajn skarabojn, birdojn k alpokaprojn. Eĉ la timemaj marmotoj estis fotografataj. En kaptilo kaptiĝis vulturo k la esploranto devis tre klopodi por subigi k kateni ĝin. En faldboato remis la unuaj homoj sur la lago. Ankaŭ radiosendstacio estis kunportita k la ekspedicio konstante havis kunligon kun Moskvo k Berlino.

Kelkaj grupoj penetris en la blankajn dezertojn de la sovaĝa montaro, reeltrovis la malnovajn transirejojn al Ĉinio k malkovris la plej longan glaciejon de la mondo, la Feĉenko-glaciejon, kiu longas 80 kilometrojn. Altaj montoj leviĝas super solecaj valoj, eterna neĝo k glacio ĉirkaŭas la pintojn. Terur-belajn bildojn vidigas la filmo, rokmurojn, glaciejajn fendojn, glitantajn nubombrojn super neĝaj kampoj.

Malfacilan taskon solvis la montgrimpantoj Vin (Wien), Alvejn (Allwein) el Germanio, k Ŝnejder (Schneider) el Aŭstrio. Post kvintaga migrado sur glaciejoj ili suriris je la 25-a de septembro la plej altan monton de Sovetio, la "Pik Lenin", 7150 m. Ili atingis la supron dum ventego k nebulo ĉe temperaturo de —30° C. Estas unu el la plej eminentaj alpismaj faroj de la lasta tempo.

La scienculoj mezuris terenon de 15 000 kvadratkilometroj, faris fotografajn triangul-mezurojn pri pli ol 1000 kv.km. k entreprenis geografiajn, geologiajn k meteorologiajn esplorojn. Oni kolektis amase plantojn, bestojn k ŝtonojn.

Pri la rezultoj de tiu atentinda ekspedicio aperis ankaŭ 2 libroj. Unu estas verkita de la rusa partopreninto Krilenko, la alia de la germana gvidinto W. R. Rikmers. La lasta libro enhavas interesajn rimarkojn k observojn pri la cirkonstancoj en USSR, ĝuste valorajn tial, ĉar ili devenas de objektiva esploranto.

F. S., Vieno.

LA KLASBATALO TRA LA MONDO

Metallaborista striko en Japanio

En Jokohama-a metalfabriko okupanta 1300 gelaboristojn eksplodis striko, pro tio ke la mastroj maldungis 70 laboristojn. La tuta laboristaro de l' fabriko solidariĝis kun la trafitoj k postulis ilian redungon. La mastroj rifuzis tiun postulon. Sed mankis bonaj strikgvidantoj, k ankaŭ preskaŭ neniu el la laboristoj apartenas al sindikato (la sindikatoj en Japanio estas tre malfortaj). Tiel estas antaŭvidebla la fiasko de l' striko; burĝa ĵurnalo jam anoncis, ke 400 laboristoj ree eklaboris en la fabriko. Ĝenerale malgraŭ la pliakriĝinta ekonomia situacio la proleta klasbatala movado reagas malforte; multaj gvidkapablaj K-doj estas arestitaj k ilia manko sentiĝas.

Ociro Nakadai.

El Bulgario

La faŝistoj en tiu ĉi lando daŭrigas ĉiutage sian kriman agadon; ili atakas organizite la laboristajn kunvenojn k turmentegas la ĉeestantojn. En la urbo Duprica la policestra sekretario publikigis alvokon, en kiu li petis revoluciemulojn, kiuj ne ankoraŭ estas perfiduloj, helpi la policon ĉe faŝistaj kunvenoj; en okazo de rifuzo li minacis ilin per pluaj turmentoj. Se renkontiĝas en iu ajn urbo du aŭ tri lernejaj amikoj, ili estas haltigataj k eldemandataj. La registaro akceptis edukad-leĝon, en kiu estas ordonita la deviga partopreno de l' lernantoj al la faŝistaj sportorganizoj. Kiu rifuzas, ne plu havas eblon esti akceptata por ŝtatserva funkcio. Laŭ la sama leĝo la nombro da lernantoj devas esti malpligigata.

Laŭ Informservo de Anark. Jun.-Intern.

El Jugoslavio

Post la faŝista ŝtatrenverso en Bulgario (junio 1923) elmigris multaj tieaj K-doj al Jugoslavio, kie ili estis amasigataj en kampadejoj k kontrolataj de la lokaj estraroj. Ili estis traktataj kiel malliberuloj k ne rajtis forlasi la difinitan lokon por serĉi alie vivrimedojn. Tial multaj el tiuj K-doj serĉas elturniĝojn. Ili provas sekrete transiri la limon, riskante esti mortpafataj de la limgardistoj. Tiel du K-doj estis mortigataj ĉe la limo en decembro 1930. Tiuokaze K-do Dimitrof el Lubliana estis malliberigata por nedifinita tempo. La jugoslava faŝismo iras egalpaŝe kun la aliloka, ĉiutage farante krimojn kontraŭ revoluciuloj.

Informservo de Anark. Jun.-Intern.

Litova juĝisto en servo de la faŝistoj

En la urbo Kibartai (Litovio) je 26. marto la kontraŭfaŝista gazeto "Musu Naujienos" estis akuzata ĉe tribunalo pro malfavora skribo en la gazeto pri malsukcesinta Hitlerana manifestacio en Ejtkunen (Eydtkuhnen), germana limurbo. La aferon de faŝista flanko gvidis advokato Paŝkeviĉius, la sama, kiu estis suspektita pro eksplodigo de l' redaktejo de "Ŝiaŭliu Naujienos". La faŝistoj havis ankaŭ tri atestantojn. Paŝkeviĉius diris, ke la nomita gazeto malvere skribis pri faŝista manifestacio k petis la juĝiston puni plej severe la respondecan redaktoron. La defendanto, eminenta ĵurnalisto en Kaŭnas, nuligis ĉiujn argumentojn de l' advokato k postulis plenan pravigon al la redaktoro. Sed, se la juĝisto ankoraŭ ne volus malkondamni la redaktoron, la defendanto petis prokraston por inviti atestantojn, kiuj pruvus, ke la gazeto skribis la veron. Anstataŭ pripensi la vortojn de l' defendanto, la juĝisto skribis decidon pli frue, ol la defendanto finis sian parolon. La redaktoro estis kondamnata je unumonata malliberigo. Multaj esprimis sian simpation al la kondamnito. Oni atendas decidon de l' distrikta juĝistaro en la afero.

La ĉeprusia fantomo.

Ĉiam ankoraŭ restas

la plej taŭga dokumento por informiĝi funde pri deveno k disvolviĝo de l' nuna situacio en la SAT-movado la

Protokolaro de la X-a SAT-Kongreso

en Londono (aŭg. 1930)

84 dense presitaj paĝoj
Specialprezo escepte malalta: 0,50 mk. g.
(sen kromrabato por membroj).

Administrejo de SAT, Colmstrasse 1, Leipzig O. 27.

LA PASTRA LECIONO

V. Ekström (12 439)

Certe vi, karaj K-doj, scias, ke en Svedio ĉiu dekkvar-jarulo, dum unu vintro unu fojon semajne vizitas kvazaŭ lernejon, en kiu pastro instruas la gejunulojn pri kristanismo.

Nuntempe oni ne povas leĝe devigi iun partopreni tian "universitaton", sed ne multaj estas, kiuj ne partoprenas. Ankoraŭ la ĝenerala opinio estas, ke ĉiu dece pensanta homo sendas sian idon al tia instruado. Svedoj ĝenerale timas esti konsiderataj kiel nedeculoj, precipe kiam temas pri religio.

La finiĝo de tia ĉepastra kurso ĉiam estas tre pompa k grava ceremonio; ĝi daŭras du ĝis tri tagojn k okazas en ŝtata, protestanta preĝejo. En tiuj tagoj la gejunuloj montras sian "kleron" antaŭ la en preĝejo kolektiĝinta publiko, ĉar la pastro, instruinta sian junan anaron dum tuta vintro, nun al ili donas demandojn pribibliajn k la instruitoj devas laŭte respondi.

La lastan tagon estas la "rava" finiĝo de la spektaklo k post la ordinara antaŭtagmeza diservo, tiuj gejunuloj, kiuj montris sufiĉan religikonon, el la propra mano de l' pastra moŝto ricevas portreton pri la karno k sango de Jesuo. Per tio la juna pekulo estas elaĉetita k li kvazaŭ aniĝis al la ĉielularo.

Kiom klare mi memoras tiun tagon de mia "pekoplena" vivo. Kvankam mi estis nur infano, tre timema, tiu granda superstiĉo naŭzis min. Mi neniel kredis la stulton, tamen neniu el ni esprimis sian dubon pri la valoro de la sankta komunio. Laŭŝajne la pastro en ni estigis grandan respekton por si, ĉar tiuj "kulturdonantoj" ja povas fieri pri ne malgranda potenco sur sian ŝafaron.

Tiele ankaŭ mi laŭnome fariĝis ĉielkredanto, sed jarojn poste ŝajnis al mi, ke la pastro estas sperta psikologo, ĉar en la biblio, kiun li ĉe la finiĝo donis al mi, li estis skribinta jenon: "Mia filo, plifortiĝu per la beno, kiu estas en la instruo de Jesuo-Kristo."

*

Kelkaj monatoj forpasis, k mi kiel proletido, filo de malriĉa ŝuisto, gajnis mian panon per disdonado de burĝa ĉiutaga gazeto. Venis la aŭtuno, k kelkaj el miaj studkamaradoj en la pastra kurso petis min aniĝi al junula asocio, kies gvidanto estas pastro, nia instruinto.

Ili diris, ke venontan someron por la membroj de l' asocio la pastro aranĝos tutsemajnan restadon, tendkolonion ĉe la marbordo. Vi pripensu, ili diris, estas tre dolĉe k sanige por ni tie sporti, bani nin ktp., tutan semajnon en sunbrilo, for el fulmo de la fabrikurbo, apud freŝa, libera marbordo.

Karaj K-doj, vi certe komprenas dekkvin-jarulojn edukitajn en kapitalisma, pastrara socisistemo, k vi ne miras, ke multaj, mi preskaŭ povas diri: ĉiuj, kaptiĝis de tia vere porjunula allogaĵo.

La somero venis, ĉio estis preta por forvojaĝi, sed kelkaj K-doj ne ricevis forpermesojn de siaj labordonantoj. Pri tio sciiĝis la pastro; li vizitis la majstrojn, ilin persvadis, k ĉiuj forveturis.

Sub helblua ĉielo, en varma sunbrilo, ĉe vasta la maro bruniĝas korpoj de junaj proletoj. Ni estas en Marstrand, unu el la plej ŝatataj banlokoj por sveda burĝaro. Nia tendkolonio troviĝas sur insulo proksima al la ban-

TAGOJ EL MIA VIVO

Mi estas anarkisto k brosista laborgvidanto k loĝas en la 1-a horzono, sub 19,1° latitudo oriente, 47,5° longitudo norde. Post ellitiĝo ĉiumatena je la 6.30 h., mia edzino preparas freŝan kafon por mi sur la gasfajrujo. Kunprenante panon, malvarman, senviandan manĝaĵon k laŭsezonajn fruktojn mi foriras je la 7-a al la fabriko, kie mi estas post 45 minutoj, k alivestiĝinte komencas je la 8-a la laboron.



Mi interrompas ĉi tiun je la 10-a por manĝi panon kun fruktoj. Poste mi plulaboras ĝis la 12-a k tiam tagmanĝas; sed ofte okazas, ke pro gravaj k urĝaj aferoj mi povas manĝi nur je la 13-a. Tuj poste mi reeklaboras ĝis la 16.30 h., sabate ĝis la 13.30. Mi hejmen iras piede. Dumvoje mi legas ĉe kelkaj gazet-administrejoj la murgazetojn k plej lastdatajn novaĵojn. Hejme mi banas min k poste ĝuas kun mia edzino senviandan manĝaĵon, ĉar ni estas jam delonge vegetaranoj, kontraŭalkoholuloj k kontraŭnikotinuloj.

Post ioma ripozo mi tralegas gazetojn, librojn, leterojn nacilingvajn k esperantajn, dum mia edzino finas la postmanĝan laboron. Kaj komenciĝas la konversacio pri ĉiuspecaj temoj (politiko, familiaj aferoj, mastrumado, en- k elspezoj, planoj ktp.). Ni vivas plenkonsente, estante samprincipanoj en ĉio. Eĉ rilate al la maltusianismo. Je la 20-a horo ni trinkas kafon, malofte ŝakludas, enlitiĝas ĉirkaŭ la 22-a aŭ 23-a k post kelkaj minutoj de babilado jam dormas. Escepto estas nur, se mi iras en klubon, organizan kunvenon aŭ esperantan societon, por instrui, aŭskulti aŭ fari ian lekcion, se okazas ie kunsido, kie mi estas ano, komitatano aŭ gvidanto. Dimanĉe k dum festotagoj ni ĉiam ekskursas, ĉar ni ankaŭ estas turistoj. Vintre kelkfoje ni iras en teatrojn, muzeojn k kinejojn.

Feriano (13 350).

NI K LA MODO

Ekzistas fakte granda nombro da laboristoj, kies sola k plej interna deziro estas povi laŭmode vesti sin, kvazaŭ tio signifus la plenumon de l' socialismo. K-do Syversen asertis pli senĝene konduti en "bona" vesto ol en "malbona". Mi ne scias, kiel li diferencigas tiujn du kategoriojn; sed, rigardante la frakon kiel modelvestaĵon, kiel li povas prezenti sin kun tia burĝa vestaĵo en proleta medio, ne timante mokon de ĉiu klera laboristo?

Certe, ĉiu provas vesti sin laŭeble orde k plaĉe, sed ni klaskonsciaj laboristoj ne oferu pene ŝparitajn monerojn por imiti la modajn stultaĵojn de l' burĝa mondo. Klerigado por proleto estas multe pli grava afero ol la plej moderna vesto. "Fraksocialistoj" neniam faris revolucion nek faros.

K-do S., vi asertas, ke vi tute malakceptas diktatorecon en la modo. Sed kio estas la nuna modo, se ne diktatoreco de kelkaj potencaj ŝtoffabrikistoj dungintaj tielnomatajn filmstelojn aŭ homojn ludantaj rolon en la plej grandburĝa societo, kiuj devas porti la vestojn deklarotajn kiel plej modernajn? Vi ne troviĝas en pli bona situacio ol tiuj homoj en la antikva Romo, kiuj estis sklavoj de sia imperiestro; ankaŭ vi estas sklavo de tiuj modo-diktatoroj. Vi ankaŭ vestas viajn infanetojn ĉiam laŭ plej nova modo.

Ekzistas kelkaj landoj, en kiuj oni enkondukis unuecajn vestaĵojn por la lernej-infanoj pro la simpla kaŭzo, ke unu infano ne opiniu sin pli bona ol alia, kiu estas en la malfeliĉa situacio havi malriĉajn gepatrojn. Infanoj ja rapide konkludas el ekstera aspekto, k la konscio pri ekstera supereco facile mortigas en ili klasan solidaremon.

La tuta temo pri modo, ŝajne bagatela, efektive influas en tre malbona maniero la cerbojn de multaj, speciale junaj laboristoj k eĉ forgesigas ilin pri la granda liberiga celo de l' proletaro.

17 245, Linz (Aŭstrio).

MALLIBERULO en Litovio petas pri SAT-literaturo (li rajtas ĝin ricevi). Kiu volas, ke ni regule sendu al tiu K-do niajn gazetojn, librojn ktp., tiu sendu helpsumeton al *Administrejo de SAT, Leipzig,* kun noto: Por Litovia malliberulo.

loka urbeto, k per boato ni preskaŭ ĉiutage vizitas la urbeton. Tie mi bone lernis kompari nian utilon en la socio kun tiu de la ĉiam ripozanta kapitalistaro. Mi ankaŭ vidis la diferencon inter virinaj vestoj ĉi tie portataj k tiuj, kiujn portas mia patrino.

Iun tagon diris la pastro, ke sekvantan vesperon ni per bruligo de raketoj partoprenos honorigon al reĝo Gustavo la V, kiu "honorigas" la banlokon per sia vizito. En tiu vespero ni estis kvin knaboj, kiuj pro "malsano" kuŝis solaj en la tendoj. La aliajn la pastro instruis honori reĝon.

La semajno forpasis, k burĝaj gazetoj laŭdis la ŝatatan junulgvidanton k pastron.

*

Denove en la hejmurbo, la pastro luas por siaj junŝafoj tri ĉambrojn, por ke ni tie kolektiĝu en propra kunvenejo. Kompreneble la burĝoj volonte kunhelpis finance, ĉar estiĝis ja tre subteninda movado. Temis ja nin gardi kontraŭ peko. Peko kompreneble estis opozicio al la kapitalista sistemo.

Do, ni fariĝis spertaj kantistoj de psalmoj k porreĝaj himnoj. Kelkaj el ni jam tiom stultiĝis, ke ili kelkfoje sin anoncis pretaj denove trinki la sangon de sia majstro k sinjoro Jesuo. Mi eble ne povas ĝuste taksi mian propran staton tiutempan, sed mi povas aserti, ke mi neniam sentis emon kanibaliĝi k trinki la sangon de Jesuo.

En iu kunveno la pastro diris, ke ni proksiman someron veturos al la marbordo de Danio. Denova alfluo de novaj anoj! Pripensu, kia avantaĝo tutan semajnon pasigi en eksterlando — k se iu ne povas pagi la etan postulatan partopren-sumon, ne gravas: la pastro lin helpas!

Proksimume 50 junuloj enŝipiĝis en Gotenburgo por veturi trans la maron al Danio. Kiom da ĝojo! La blankvizaĝa k malgrasa juna teksisto k ŝpinisto dum tuta semajno enspiros ne polvon k malfreŝan aeron de malluma fabriko, sed sanigan, puran aeron ĉemarbordan. Ili vidos la vastan maron, ripozos en herbo sub brilo de l' kara suno!

Karesataj de facilaj ventoj, sub varma sunbrilo, sportantaj k banantaj sin en sala maro pasas rapide lumaj tagoj. Anemiaj junproletoj ricevas sanan vizaĝ-aspekton k vivoĝojo brulas en okuloj de ni malfavoratoj de la kapitalisma socio. (Daŭrigota.)

Por nia medito

Se ci estas sklavo, ci ne povas esti amiko. Se ci estas tirano, ci ne povas havi amikojn.

Dum longa tempo sklavo k tirano sin kaŝis en la virino. Tial la virino ne ankoraŭ kapablas je amikeco: ŝi konas nur la amon. Niĉe *(Nietzsche).*

Virino ne ankoraŭ kapablas amikecon. Sed diru, ho viroj, kiu el vi kapablas amikecon? Niĉe.

Malbenon al via malriĉo k avaro de la animo, ho viroj! Kion vi donas al viaj amikoj, tion mi volas doni eĉ al miaj malamikoj, ne fariĝante pro tio pli malriĉa. Niĉe.

En cia amiko ci devas vidi cian plej bonan malamikon. Estas kiam ci luktas kontraŭ lin, ke ci devas esti plej kara al li. Niĉe.

TRA ESPERANTIO

Al niaj pasivaj membroj!

Ĉar ne estas eble individue respondi al ĉiuj demandoj ricevitaj de pasivaj membroj k ĉar la respondo estas ĝenerala, do valora por ĉiuj pasivaj anoj de SAT, ni publikigas ĝin en "S-ulo", petante la aktivajn SAT-anojn konigi tiujn ĉi liniojn en la rondoj k grupoj.

Por fariĝi aktiva membro, ne necesas atendi la 1-an de januaro aŭ alian difinitan daton; oni povas fariĝi tia ĉiutempe, per pago de l' aktiv-membra kotizo. Al tia membro estas postliverataj la gazetoj aperintaj; se iuj numeroj estas elĉerpitaj, ekvivalento per libroj estas donata; same ni agas, se li ne deziras *ĉiujn* aperintajn numerojn. Ekz. se iu aliĝis aŭ rekotizis por la jaro 1931 kiel pasiva membro pro monmanko, k en junio ricevas laboron k havas la necesan monon por pagi al SAT la aktivan kotizon, do li povas aranĝi la aferon tiel: ekz. 2,50 mk. li jam pagis por la pasiva membreco, do mankus por la aktiva kotizo ankoraŭ 8 mk. g. por la jaro 1931. Sekve li simple sendas al ni la restsumon k deklaras fariĝi aktiva membro. En ĉi tiu kazo la Administracio registras la koncernan membron kiel aktivan k sendas al li kotizmarkon aktiv-membran, kiun li simple gluu sur la "pasivan kotizmarkon". La samon li povas fari je ajna dato.

Do estas nenia baro por membroj pasivaj, kiuj intencas fariĝi pli malfrue aktivaj. Ni konsideru, ke la pasivaj membroj, kiuj pagas tiom malaltan kotizon, efektive neniom pagas por la Asocio, ĉar ili ricevas 1. membrolibreton, 2. jarlibron, 3. rabaton al la SAT-libroj k 4. povas uzi la servojn de la Asocio. Aliflanke ni petas konsideri, ke la Asocio bezonas monon, precipe nun, kiam estas artifike retenata nia mono en Sovetio.

Kelkaj SAT-rondoj tre lerte aranĝis la kotizpagon al SAT. La peranto kolektas monate aŭ semajne ioman sumeton por pagigi la SAT-kotizon k kvaronjare li sendas la tutan kolektitan sumon al la Adm. kun detala nomaro de la partopagintoj (per ĉi tiu procedo la K-doj eĉ ŝparas afrankomonon). Tiel al ĉiu estas tre faciligita la pagmaniero (semajne estas 20 fenigoj); krome nur unu faras la laboron, sendi monon k korespondaĵojn.

Administracio de SAT.

Rimarko. Konsiderante la ĉi-jaran grandan "Varbkonkurson" k por ĉiel faciligi al niaj Gek-doj la varbadon de *novaj aktivaj membroj* dum la kuranta jaro, ni decidis, akcepti novulojn ekde la dato de ilia aliĝo kiel membro-abonantojn, ne postulante postpagon de l' kompleta jarkotizo. Ni registros ilin kiel aspirantojn je aktiva membreco, kiuj (ĉar ni devas obei al nia Statuto) akiros la voĉdonrajton nur ĉe la sekvonta 1. januaro, kiam ili rekotizas.

Perforti la Statuton por finfari la skismon!

La ŝtel-referendumon de l' opozicio "*rajtas* k *devas* partopreni ĉiu SAT-ano, kies nomo troviĝas en la lasta jarlibro 1929/30 . . ." deklaras senĝene la aranĝintoj de tiu kontraŭstatuta faro. La fakto, ke nomo troviĝas en la Jarlibro 1929/1930, neniel estas sufiĉa pruvo, ke la nomito estis SAT-ano en 1930. Oni ja legas en tiu Jarlibro sur pĝ. 60: "Tiu ĉi adresaro entenas la adresojn de tiuj membroj, kiuj posedas la kotizmarkon por la jaro 1929 **aŭ** 1930." Sekve eĉ membroj el jaro 1929, *kiuj ne rekotizis por la j. 1930,* ricevis la opozician voĉdon-materialon! Pri tio ni havas pruvojn. Aliflanke la novaliĝintoj post la sendo de l' Jarlibro (en jan. 1930) havas la malavantaĝon (?!) ne povi partopreni la ŝtel-referendumon.

Forlasinte la statutan bazon, la opozicio senhonte daŭrigas sian vojon de l' **perforto** k de l' **malhonestaj agoj**. Ni ne dubas, ke ĉiu honesta k komprenpova SAT-ano sciu laŭmerite trakti la ricevitan paperaĵon, kiu estas **absolute senvalora!**

★ XI. Kongreso de SAT en Amsterdam (Nederl.)

2.–7. aŭgusto 1931.

3. Komuniko

Pri pasportoj. Loĝantoj de jenaj landoj *ne* bezonas nederlandan vizon por envojaĝi Nederlandon: Aŭstrio, Belgio, Bolivio, Britio, Danio, Dominik. Resp., Estonio, Finlando, Francio, Germanio, Hispanio, Italio, Japanio, Luksemburgo, Norvegio, Portugalio.

Al kelkaj. Ni ne presigis afiŝojn, do ne povas sendi.

Subteno. Ni kvitancas la ricevon de jenaj monsumoj kiel subtenon al la Kongreso: De T.V., dol. 0,75; J. D. v. d. E., guld. 1,—; J. S. ŝil. 2,—, I.T.F. (Transportlab. Fed.) guld. 50,—.

1. listo de aliĝintoj

			SAT-matr.
1.	Veenstra, D.,	Amsterdam (Ned.),	13 610
2.	Preeker, J.,	Amsterdam (Ned.),	15 976
3.	v. Ossenbruggen, D. H.,	Amsterd.,	5 943
4.	*Bishoff, H.,	Amsterdam (Ned.),	15 408
5.	Koth, O.,	Potsdam (Germ.),	16 174
6.	*Koth, E.,	Potsdam (Germ.),	12 943
7.	Ceeney, H.,	London (Anglio),	12 979
8.	Benjamin, J. W. J.,	Amsterdam (Ned.)	5 288
9.	Martens, H.,	Berlin (Germ.),	15 496
10.	Hoogervorst, H. A.,	Aalsmeer (Ned.),	5 612
11.	Köckeritz, P.,	Dresden (Germ.),	77
12.	Roelofs, G.,	Amsterdam (Ned.),	14 941
13.	v.'t Hof, J.,	Amsterdam (Ned.),	14 946
14.	Heck, F.,	Frankfurt a. M. (G.),	15 709
15.	Weder, T.,	Nov-Jorko (Usono),	1 307
16.	Suk, J.,	Amsterdam (Ned.),	14 561
17.	Minke, J. W.,	Amsterdam (Ned.),	14 942
18.	Smit, N. B.,	's Gravenland (Ned.),	10 673
19.	Wettig, O.,	Gelnhausen (Germ.),	16 900
20.	v. d. Ende, J. D.,	Santpoort (Ned.),	8 814
21.	Long, D.,	St. Albans (Anglio),	13 232
22.	Sulsky, J.,	Harpenden (Anglio),	4 304
23.	Duif, A.,	Amsterdam (Ned.),	16 599
24.	v. Loen, L. C.,	Amsterdam (Ned.),	16 273
25.	de Bruin-Vels, G.,	Enschede (Ned.),	5 877
26.	de Bruin, G. P.,	Enschede (Ned.),	670
27.	Borg, L.,	Odense (Danio),	11 534
28.	v. d. Brand, M.,	Amsterdam (Ned.),	13 609
29.	Deiters, F.,	Kassel (Germ.),	264
30.	Killmer, E.,	Elberfeld (Germ.),	8 330
31.	Osterholm, K.,	Malmö (Svedio),	4 226
32.	Moravec, F.,	G. Ottersleben (G.),	14 624
33.	Duinker, J. M.,	den Burg (Ned.),	3 691
34.	Pelcman, J.,	Plzen (Ĉeĥosl.),	14 382
35.	Panovits, S.,	Soetrich (Francio),	16 226
36.	Lanti, E.,	Paris (Francio),	1
37.	Banmer, L.,	Paris (Francio),	11
38.	Polgar, V.,	Paris (Francio),	13 257
39.	Bartelmes, N.,	Paris (Francio),	1 768
40.	Platiel, H.,	Leipzig (Germ.),	3 020
41.	Schneider, W.,	Sulzgries (Germ.),	5 488
42.	Lerchner, R.,	Leipzig (Germ.),	90
43.	*Lerchner, C.,	Leipzig (Germ.),	2 465
44.	Schinkel, R.,	Leipzig (Germ.),	135
45.	Michel, P.,	Leipzig (Germ.),	5 525
46.	Ples, F.,	Amsterdam (Ned.),	16 459
47.	Oele, J. M.,	den Burg (Ned.),	16 763
48.	Roggeveen, J.,	Haarlem (Ned.),	17 304

* Signifas K-dino.

MI VOLAS SCII . . .

Antaŭ la mondmilito la eksiĝo el la eklezio en Germanio estis malfaciligita per ĉikanoj k monkostoj. Tio aliiĝis. Ĉar mi opinias gravega la liberpensulan movadon, interesus al mi aŭtentikaj informoj pri jenaj demandoj:

1. Kiaj estas leĝoj k procedoj tiukoncernaj en pure katolikaj (romanidaj) landoj k ĉe orientlandaj k aliaj konfesoj? (kompreneble krom USSR). 2. Ĉu la liberpensula movado en tiuj landoj (krom faŝiste regataj) estas malhelpata aŭ persekutata de la registaroj? 3. Kion agite entreprenas la liberpensulaj grupoj k asocioj prefere? 4. Ĉu en viaj landoj la agitlaboro sukcesas en kamparaj regionoj?

W. R. (16 652).

KUN TIU ĈI NUMERO ESTAS EKSPEDATA "LA LERNANTO"

Ankoraŭ mensogo refutenda!

En "Isto" n-o 11 sur pĝ. 84 asertas la Amsterdama opoziciulo Dekker, ke "la presservo (t. e. la gazetservo de SAT. — *Red.*) dum la unuaj jaroj estas eldonita aparte de "S-ulo" kun granda peno, ciklostilita k prilaborita de K-do Besler, mone subtenata de la diversaj kunlaborantoj, kvankam SAT estas fondita unue por priservi la per-esp-an laboron".

La vero estas jena: SAT pagis por la gazetservo al Besler de 28. 12. 26 ĝis 28. 2. 30 la sumon de *1060 mk. germ.*, do meznombre 3—400 mk. g. jare, kiu sumo estis konsentita al ĝi dum la Leningrada Kongreso (1926). Post la Lajpciga Kongreso la pago plimalgrandiĝis, ĉar la gazetservo de tiam aperis en "S-ulo".

Jen kontroleblaj k nekontesteblaj nombroj! Sed tion *devas* ignori la opoziciulo Dekker, ĉar aliel lia skribaĵo ja perdas sian tutan signifon.

Socialista studenta revuo enhavas esperanto-rubrikon

Malmultaj socialistaj studentaj unuiĝoj havas sian propran organon. La flandra havas tian: "Menschen" (Homoj) estas la nomo de la revuo. Sed kiom da eksterlandanoj komprenas la nederlandan lingvon? Malmultaj.

Jam ĉe la apero de l' revuo, K-do A. Verhulst aperigis esp-lingvan artikolon k petis kunhelpon de ĉiuj socialistaj studentoj-esperantistoj. Tujan sekvon tiu provo ne havis. En januara n-o de ĉi tiu jaro aperis nederlandlingva artikolo pri esp-o. Samtempe oni klopodis, ke esp-rubriko estu en "Menschen". En feb./marta n-o la rubriko jam estas aperigita, redaktita de K-do I. van Praag. En la alvoko al la studentaro socialista la red. diras interalie: "Ni malfermas niajn paĝojn por la opinioj de niaj eksterlandaj K-doj, precipe por tiuj, kies unuiĝo ne havas propran revuon."

Ni esperas, ke tiun unuan agon sekvos aliaj. La franca socialista studentaro pritraktos dum sia nuna jarkongreso la demandon pri esp-o. Ankaŭ en ĝia organo "L'Etudiant Socialiste" esp-o post la kongreso havos rajtojn. K-do J. Pŭarando (Poirandeau) laboras por tio.

Gek-doj, kiuj volas, ke esp.-revuo de studentaro socialista tutmonda ekaperu, agu. Klopodu ĉe via nacia unuiĝo, precipe se ĝi sian propran organon ne posedas. Postulu, ke naciaj unuiĝoj okupiĝu pri esp-o, diskutu tion dum la kongresoj. Skribu rekte al la internacia sekretario, K-do O. Fridlender (Friedländer), ke oni ekzamenu la eblon eldoni intern. revuon, ĉe la komenco eĉ nur bultenon malgrandan. Apogu vian agadon sur la ekzemplo de "Menschen" k baldaŭ tiu de l' "Etudiant Socialiste". Petu provn-ojn de "Menschen" k alsendu al K-do F. J. Willems, Pollepelstr. 27, Gento (Belgujo) artikolojn pri studenta vivo vialanda. De K-do O. Friedländer, Landshuter Str. 37, Berlin W 30, petu informojn pri eldono de internacia revuo. Per agoj ni sukcesu. E. M.

NEUZITAJ ESPERANTO-RIĈAĴOJ

Ĉiu malnova esperantisto havas de siaj eksterlandaj amikoj multajn leterojn, kiuj kuŝas senutile en lia tablokesto. Do, inter tiuj leteroj estas multaj tre valoraj por la historio: ekzemple, leteroj skribitaj de militistoj dum lastatempaj militoj, leteroj de partoprenintoj je revolucioj, ribeloj, strikoj ktp. Same ofte estas interesaj la leteroj de ordinaraj homoj dum ordinaraj tempoj: ĉiu pasinta epoko estas siaspece originala. En ĉiu lando ekzistas unu aŭ kelkaj historiaj gazetoj (nacilingvaj), presantaj diversajn memuarojn, taglibrojn, leterojn historie interesajn. En tiaj gazetoj sukcese povas esti presataj serioj da esp-istaj leteroj. Tio povas esti tre utila historia materialo k samtempe bonega propagando por esp-o. Nur uzu la leterojn laŭ permeso de iliaj aŭtoroj aŭ la leterojn de mortintoj, ĉar aliokaze povas esti iufoje malbonaj rezultoj por la skribintoj. *Pitosaj* (Sovetio).

TRA LA MOVADO

KRONIKO

Belgio. *Antverpeno.* Kurso komencata ĉe socialista filatelista grupo. Ĉiusemajne aperas en soc. ĵurnalo "Volksgazet" esp-rubriko. La 21-an de marto K-do van Praag paroladis antaŭ la mikrofono de Soc. Radio-Asocio Flandra (S.A.R.O.V.) pri esp-o. *Gento.* Kurso en la "Volkshoogeschool" (Popol-altlernejo) por 15 partopr. En Vooruit", grava soc. ĵurnalo, aperis du grandaj artikoloj pri esp-o de ĵurnalisto d-o Lode Crayebeck. Preskaŭ ĉiusemajne aperas novajoj pri esp-o en tiu ĵurnalo.

RECENZEJO

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitajn ni nur mencias.

Manifesto de la Sennaciistoj. Eldonis: Sennaciista Frakcio el membroj de Sennacieca Asocio Tutmonda. Nov-Jorko 1931. Form. 12×15 cm; 32 pĝ. Prezo 1,50 fr. aŭ 1 respondkupono; ĉe K-do *Avid, lobis, rue J.-B. Baudin, Villejuif (Seine) Francio.*

Kun granda intereso, eĉ kun vera plezuro mi legis ĉi tiun manifeston. La legantoj tuj k senpene komprenos la gravan diferencon, kiu ekzistas inter sennaciismo k internaciismo. Unuflanke, dum ke la internaciistoj sin deklaras por la sendependeco de la ŝtatoj, por la aŭtonomio de l' patrioj, por la konservado de la naciaj kulturoj, lingvoj, moroj k tradicioj, la sennaciistoj kontraŭe prezentas al si la teron kiel *unuon*, kiel *tuton* apartenantan al ĉiuj teranoj; ili batalas kontraŭ ĉio nacieca k deklaras laŭte, malkaŝe, ke ili ne volas partopreni en iaajn agitado aŭ batalo por liberigi la naciojn, tial ke la sola batalo profitodona por la proletaro estas la *klasbatalo*.

Aliflanke, dum ke la internaciistoj konsideras la lingvon internacian nur kiel helpan lingvon, akirindan apud la gepatra lingvo, la sennaciistoj deklaras, ke esp-o estas ilia ĉefa lingvo k ke ili konsideras la naciajn nur kiel helpajn. Ili opinias, ke la definitiva emancipiĝo de l' proletaro, ke la starigo de l' socialismo estas neebla sen ia lingvo tutmonda. Internaciistaj gvidantoj kontraŭe ne favoras esp-on, tial ke ili sentas, pli malpli konscie, ke ilia influo malfortiĝus, se ĉiuj proletoj povus interrilati senpere tra la tuta mondo.

La sennaciistoj kompreneble tre bone scias, ke ilia vidpunkto estas *nuntempe* utopia; sed ĉu la socialismo k esperanto mem ankoraŭ nun ne estas utopiaj? Tamen socialistoj k esperantistoj laboras por la disvastiĝo de sia idealo: nuntempa utopio estas fariĝonta la estonta realo. Krom tio, la sennaciistoj tute ne intencas apartiĝi de la internaciistoj; ili ne celas formi fermitan sekton, sed volas nepre resti en intima kontakto kun la klasbatala movado k postulas en SAT nur egalajn rajtojn.

Ĉu oni aprobu aŭ malaprobu la tezon, klare esprimitan en tiu ne ampleksa sed grava verko, neniu prave povus ĝin malhavi. *H. B.*

Nia Teatro. "Biblioteko de Sennaciulo" n-o 14. Eldono de SAT, 23, rue Boyer, Paris (20), Eld. Fako Kooperativa, Leipzig O 27, Colmstr. 1. Form. 12×15 cm; 62 pĝ. Prezo: 0,60 mk. g.

Jen estas bela libreto, interesa k lerte verkita; ĝi enhavas: 1. ian teatraĵon, *La Lignovermo*, bone aranĝita, kun vigla dialogo, kies morala celo estas laŭdinda: Ŝrajner, la entreprenisto, estas fine devigata altigi la salajron de siaj laboristoj k la spiono Fajfer estas maldungita; 2. ian mallongan dramon, *la Versaja* (Versailles'a) *Kaptito*, epizodo de la Pariza Komuno, kie la juna, heroa kaptito, Paŭlo Morel, preferas morti ol perfidi sian idealon; k 3. kelkajn klasbatalajn versaĵojn por deklamo, inter kiuj la lasta, la *Almozpetulo*, estas profunde kortuŝa.

La stilo estas absolute klasika.

H. B.

SAT estas kolektejo por ĉiuj laboristaj esp-istoj el ĉiuj partitendencoj, kiuj akceptas la principon de la klasbatalo.

L. L. Zamenhof. Fundamento de Esperanto. Gramatiko, ekzercaro, universala vortaro kun *ĉina* traduko de *Li Løk.* 1-a eld. 106 pĝ. Biblioteko de Kantona Esp. Instituto, n-o 5, 1930. Form. 13×18. Prezo: arĝ. dol. 0,70.

H. Haefker. Jarmiloj pasas. Universala historio en 2 volumoj. Duonlede bindita. 1-a vol.: 9 mk. g. La dua vol. aperos en aprilo 1931. Eld. Heroldo de Esperanto, Brüsseler Str. 94, Köln. 245 pĝ. Form. 15 × 22,5.

Dum multaj jaroj ĉiuj klarvidaj esperantistoj prave plendis pri la neseriozeco de la esperantlingva literaturo, kiu prezentis al la publiko preskaŭ nur mirrakontojn, legendojn, infanaĵojn, bagatelaĵojn k senvalorajn fantaziaĵojn. Grandan laŭdon meritis SAT sekvante tuj dekomence alian vojon k publikigante serion da serioz-

Ni ankaŭ akceptas
¼jaran abonon!

aj verkoj. Tiun novan tute aprobindan tendencon ŝajnas emaj imiti de kelka tempo aliaj esp. eldonejoj, kiel pruvas la ĵusa apero de la libro pri la polusa ekspedicio de Andrée k de la prihistoria verko de s-ro Haefker. Tiu ĉi libro estas aplaŭdinda ne nur ĉar ĝi estas serioza, sed ankaŭ ĉar ĝi estas interesa k valora. Oni povus prave titoli ĝin "Pripensoj de libera spirito pri la mondhistorio". La komentoj de la aŭtoro pri la historiaj faktoj kompreneble ne estas ĉiam nekontesteblaj, ĉar ili neeviteble enhavas multajn nepruveblajn hipotezojn, sed ili estas ĉiam atentindaj k pensinstigaj. Oni povas tamen bedaŭri, ke ofte la abstraktaj k teoriaj rezonoj ne estas sufiĉe precize apogitaj sur difinitaj faktoj k ke kelkfoje la sinsekvo de la ideoj estas malfacile sekvebla. Multaj certe dubos, ĉu la vivo de la prahomoj estis tiel feliĉa, idilia, paradiza k tiel konstante gvidata per raciaj principoj, kiel imagas la aŭtoro, eble inspirata de la fantaziaĵoj de J. J. Rousseau. La ĉapitro, kiu disvolvas la iompostioman naskiĝon k evoluon de la socio k de la ŝtato, nepre bezonas multajn plikompletigojn k klarigojn, kiujn la leganto feliĉe trovos en la kerneca k luma verko de Lanti pri Naciismo. La barbaraj invadoj ne ŝajnas prezentitaj en la ĝusta lumo k la aŭtoro eble iom tro mallonge resumas ilin. Oni ankaŭ dezirus pli detalan k pli sufiĉan klarigon pri la formiĝo k stariĝo de la Eklezio. La evoluo de la arto tia, kia ĝi estas prezentita, estas vere tro hipoteza. Ĝenerale la aŭtoro ŝajnas tute ne koni la verkojn de la negermanaj, precipe de la francaj k italaj, historiistoj. Malgraŭ tiuj kritikoj ni ne devas forgesi, ke la tasko estis tre malfacila k ke la aŭtoro, kuraĝinte entrepreni ĝin, meritas sinceran gratulon. La tuta verko spiras konstantan aspiron al definitiva paco ampleksanta la tutan homaron. La stilo estas ĝenerale bona k gramatike korekta, kvankam ĝi estas kelkfoje iom malklara k la vortoj ne estas ĉiuokaze ĝuste k proprasence uzitaj. Tute malaprobinda estas la tro ofta uzado de la prepozicio JE en okazoj, kie la leganto restas dubanta pri ĝia preciza signifo.

E. G. M.

MEMORNOTO

Represis el "S-ulo":
L'Action Laique, St. Etienne, apr., El Italio; *Volksstimme,* Chemn., 12. 2., fabrik. de militiloj en Fr. (328), 4. 3., teroro en Polio (333), bombprotesto en Belg. (334).

Priesper. artik. k notojn enhavis:
Travail, Lyon, 28. 3., *Signalen,* Stokh., 26. 3., *Volksstimme,* Chemn., 7 notoj en feb./marto, *Le Cri du Peuple,* Paris, 2. 4. (longa dokumentuma artik.).

Pri 11-a SAT-Kongr. anoncis:
Volksstimme, Chemnitz, 18. 3.

Peresper. materialon enpresis:
Volksstimme, Chemn., 11. 2. (el soc. esp. gazetservo).

NIA POŜTO

Memorigo. — Pri ricevo, uzo aŭ neuzo de manuskriptoj ni kvitancas ĉi tie nur, se la sendintoj speciale esprimas tiun deziron.

9951. — Vian materialon bontaŭgan ni ricevis.

Esperantista Tendaro

13 km. de Nice. Vivo sub tendoj. Suno tutan jaron. Plena pensiono en tendo de 4 mk. g. Spec. prezo por karavanoj. Ekskursoj, nekare: Alpoj, Monte Carlo, Italio ktp. Skribu al: K-do Yelland, ASPREMONT apud Nice (Francio).

Intersteno

la kato (esp.) le jour (franc.) the town (angl.) die Tal (germ.) кура (rus.)

Por ĉiuj lingvoj la samaj signoj

Koresponda skribo (fundamento) RM 1.—
Rapida skribo (supera ŝtupo) . . . RM 1.—
3 aldonoj por po 7 naciaj lingvoj po RM 1.—

Instituto de Intersteno
Friedenstr. 79, Duisburg (Germanio)

Haveblaj ankaŭ ĉe la
ADMINISTRACIO DE SAT
Colmstrato 1, LEIPZIG O 27.

KORESPONDADO

ĈEĤOSLOVAKIO
K-do Andrej Turĉik, Sabinovska str. 65, *Prešov,* interŝ. PM, kĉl. Resp. garantiata.

ESTONIO
— 25 kursanoj (gefraŭloj) koresp. kĉl, PI, bfl. Adr.: Esperanto Grupo Aleyivalitsus, *Antsla.*

GERMANIO
Atentu! — Lab. Esp. Grupo aranĝos la 1. 5. ekspozicion. Sendu L, PK, PI, ĵurn. ktp. Skribu multnombre, ni certe resp. Adr.: K-do Paul Klemm, Hugostr. 54, I, *Bottrop/W.*

K-do Emil Fehle, Obergasse 9, *Frankfurt/M.-Hausen,* kĉl, pri ĉ. temoj, L, PI, pref. kun Ĉinio, Japanio, Persio k Hindio. — Resp. garantiata.

Atentu! — K-do Reinh. Walter (13 640) nun loĝas: Altwasser Str. 11, *Weisstein, Kr. Waldenburg i. Schles.* — L, PI, PK, kĉl.

HISPANIO
K-do A. Nadal, strato Pont y Vich, 14, *Palma,* Baleares, PM, kĉl. Resp. garantiata.

NEDERLANDO
La sekcio "Zaandam — Antaŭen" de la Fed. de Lab. Esp. serĉas koresp-antojn por siaj membroj k kursanoj. Skribu multnombre! — Jan Vis, Zuiddijk 306, *Zaandam.*

SOVETIO
Por ekspozicio sendu: PI (ne vidaĵojn), infangaz., desegnojn de gelernantoj, lernkajerojn, natursciencajn lernolibrojn k ĉian taŭgan materialon al adr.: K-do Stefan, *Aŝhabad,* Narkompros, TSSR, Turkmenio.

K-do V. Strumunikov, poŝtkesto, 16, *Koĥma,* Iv.-Vozn. gub., kĉl, pri ĉ. temoj.

POŜTMARKOJ

Mi volas interŝ. PM kĉl. Respondo garantiata. Adr.: Erkki Herkman, L. Papink. 8, C 21, **Helsinki** (Finlando).

Por gelernantoj de nia kurso k por mi mem longdaŭra koresp-ado estas serĉata. Volonte ni interŝ. PM, PK, PI, il. gaz., fotojn ktp. Skribu — ĉu individue, ĉu kolektive. Ni nepre k senprokraste resp. Adr.: K-do Fritz Hofmann, Stiehlerstrasse 3, **Langebrück/Sa.** (Germ.).

Korespondadon k letervesperon

La lab. Grupo Ansbach, Bavario, petas vin interrilati kun ni por korespondi. Temoj: Politiko, esp. varbado, religiaj temoj k "La vivo de la laboristoj en aliaj landoj". Krom tio vi estas petataj sendi ion al ni okaze de nia kursfiniĝo. Rekompence vi ricevos gvidilon pri nia bela urbo. Nepre sendu ion ĝis 1. majo.

Lorenz Dörr, Ansbach, Rabenstein 6

Kiu hispana aŭ franca K-do emus fari kun mi 5-monatan biciklan vojaĝon al Sud-k Okcident-Eŭropo, komencante meze aŭ fine de majo? Eble li estas iomete muzikema k disponas pri iom da mono. — Koncernajn leterojn oni sendu al *Ottomar Scholl, Döbeln i. Sa.,* Staupitzstr. 11, Germanio.

ENHAVO

	pago
Naciismo k ekonomiaj problemoj en Hindio	**225—26**
Raciigo en la angla karb-industrio	**226**
Raciigo en la konsumado	**226—27**
La pamir-ekspedicio en 1928	**227**
La klasbatalo tra la mondo	**228**
La pastra leciono	**228—29**
Tagoj el mia vivo	**229**
Por nia medito	**229**
Tra Esperantio	**230—32**
Korespondado	**232**

Presejo: Neudrag, Leipzig (Germanio)

M 1c Paul Gottgetreu, Herrenstr. 12